Christian Morgenstern,

# Tento

*tradukita de Willy Nüesch*

Mi ĉe abismo kun hezit'
staris kaj diris, dum l' okul'
rigardis sob: Ek, senmortul'!
Necesas nur via decid'.

Ekdormos di', vekiĝos di', -
vi diris mem. Ekdormu do!
Ne estingiĝos la ego',
ĉar nur la formon ŝanĝos vi...

- Ne ĉesis mia taglabor'.
Se iu pekas per eksterm'
de l' ŝel' antaŭ matur' de l' kern',
tro frue dormas li - kaj hor'
tro tarda vekos lin.

*Traduko de la Germana poemo "Versuchung" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-127-249 (2013-08-28 18:42:27)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56)donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net". Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*